

Majakovskij, Rolland: Brecht, Majakovskij kaj Rolland adresiĝas al la intelekto de spektanto, al lia racia penso. Dadaistoj kaj surrealistoj ignoras la intelekton kaj racian penson. Surrealistoj adresiĝas al la subkonscio, esperante vekti dormantajn instinktojn. Dadaistoj proponas nur neigon kaj detruon. Ni povas diri, ke laŭ la formo dadaistoj kaj surrealistoj uzas foje similajn metodojn, sed uzas ilin por aliaj celoj ol realistoj aŭ futuristoj.

Samtempe kun novaj skoloj kaj tendencoj daŭre vivas realisma arto. Sed ankaŭ ĝi evoluas. Preferante tradiciajn formojn, verkistoj-realistoj renovigas la enhavon, ili esploras novajn temojn: revolucio (en Francio Romain Rolland verkas ciklon el ok dramoj "Teatro de la Revolucio", en Rusio dramverkoj de Maxime Gorki); ĉiutaga vivo de mizeruloj (Gorki, "En la fundo"); faŝismo (Brecht, "Timo kaj malespero en la Tria Imperio"); luktoj de laborista klaso ("Malamikoj" de Gorki); sciencisto kaj socio ("Infanoj de suno" de Gorki, "Ludo de amo kaj morto" de Rolland, "Vivo de Galileo" de Brecht).

Do, en malsamaj landoj ni vidas du ĉefajn tendencojn en la evoluo de dramverkaro kaj teatro: realismaj verkoj kun pli-malpli tradicia formo kaj renovigita enhavo kaj la verkoj eksperimentaj de la vidpunkto de la enhavo kaj la formo.

Adreso de la autorino:

Nina Ivanovna KORJENEVSKAJA
d-ro pri Filologio
Baŝkiria Ŝtata Universitato
RU - UFA
RUSIO

Pomarba Kancero kaj Kuracadoprovoj per Fungicidoj

HUANG YINBAO (CN)

Pomarba kancero estas la plej grava el la pomarabaj malsanoj. Ĝi troviĝas ĉie en la mondo, kie pomarboj kreskas. La malsana atako ofte pereigas la arbon, eĉ la tutan ĝardenon, pro tio oni nomas ĝin "kancero". Por efike kuraci la malsanon, la aŭtoro faris esploron kune kun esperantlingvaj agrikulturaj specialistoj. Longa esploro liveris fine bonefikan fungicidon.

1. Simptomo de la pomarba kancero.


Oni scias, ke la pomarba kancero povas damaĝi plenaĝajn kaj junajn pomarbojn, eĉ la idojn. Tamen, la malsano damaĝas ĉefe plenaĝajn pomarbojn, precipe la branĉiĝajn punktojn de la ĉefbranĉoj.

Ekzistas du simptomaj specoj de la malsano: la ŝeloputriĝo kaj la velkiĝo de la junaj branĉoj.

La ŝeloputriĝo: la malsana loko estas ne klare videbla en la unua tempo de la malsaniĝo. Sed oni povas vidi malgrandajn malhel flavajn punktojn sur la arboŝelo, aŭ sub la ŝelo aperas brunaj punktoj, se oni fortiras la ŝelon. Sub la arboŝelo la punktoj fariĝas klare videblaj, kiam la kondiĉo por la malsano estas favora. Se oni premas la videblajn markojn, elfluas iom da nigraflava likvaĵo. La malsanaj ŝeloj estas facile forigeblaj. La malsanaj lokoj putriĝas, odoras je alkoholo kaj iom post iom nigriĝas kaj sekiĝas, postkiam la akva likvaĵo estas vaporiĝinta. Se pluvas aŭ se la aero fariĝas humida, troviĝas sur la malsana loko malgrandaj punktetoj; tiuj estas sporosakoj enhavantaj multegajn sporojn de la malsaniga fungo. La malsanaj lokoj iom post iom grandiĝas. La trunka superaĵo de malsana arbo mortas pro akvo- kaj nutromanko, kiam la markoj ĉirkaŭas ringforme la trunkojn aŭ la branĉojn.

La velkiĝo de juna branĉo: tio okazas ĝenerale ĉe la 2-3 jaraĝaj pomarboj. La malsana loko estas nenormalforma. Sur la loko ofte troviĝas brunaj lauvice ringformaj linioj, kiuj konsistas el sporsakaj punktoj. La superaĵo de la malsana branĉo mortas velkante pro akvo- kaj nutromanko, kiam la malsana loko ringforme ĉirkaŭas la branĉon.

Lau nia studado, la ĉefa kaj plej grava speco de la malsano estas la ŝeloputriĝo, dum ke la junbranĉa mortiĝo estas malpli ofta en nia regiono.



Bildo pri pomarba kancero

1. Ŝelputriĝo
2. Velkiĝo de juna branĉo
3. Pomarba fungo (x 700):
 - a. piknido
 - b. sporteniloj
 - c. konidioj
 - d. sporsako au sporamaso

2. La malsanigaj kondiĉoj kaj reguloj.

La pomarba kancera fungo (*Podospaera leucotricha* SALM) (*Valsa malt Miyabe et Yamada*) estas iom parazita. La funga korpo (micelio) kaj la konidio estas videblaj en la malsanaj ŝeloj de vivaj kaj mortaj arboj. Post pluvado en la fino de marto de venonta printempo, la funga konidio ensorbinta akvon naskigas sporamasojn, kiuj dispartiĝas lau akvofluo kaj vento por damaĝi aliajn pomarbojn.

Lau niaj studoj en Jingchuan Gubernio de provinco Gansu la malsaniga fungo facile atakas la pomarbojn, kiam ili estas tute au parte malfortaj. Sanaj kaj pli fortaj pomarboj estas ne ofte atakataj. Preskau ĉiuj kondiĉoj malfavoraj al la pomarba kreskado subtenas la malsaniĝon, ekz. nutromanko, akvomanko, frosta katastrofo, malboniĝo de grundo, insekta damaĝo. Lau tre multaj informoj el Ĉinio ankaŭ tro da nitrogeno estas favora al la malsaniĝo. Sed lau niaj studoj, manko de nitrogeno same estas grava kialo de malsaniĝo. (Pri tio ekzistas speciala raporto en la internacia lingvo, havebla de la aŭtoro).

La malsaniga fungo atakas la pomarbojn tra diversaj vojoj, ekz. vundoj en la arboŝelo, frostvundoj, per insektoj kazitaj vundoj, fizike au mekanike ricevitaj vundoj, sunbrulaj vundoj. La malsaniga fungo enpenetras la malfortan pomarbon ankaŭ tra la poroj de la ŝelo. Entute, vundoj de la ŝelo estas grava kialo de malsaniĝo.

Lau observado de la aŭtoro en la vilaĝoj Yaodian, Huang Jiapu kaj Libu, la malsano komenciĝas je la mezaj au lastaj dektagoj de marto kaj amase damaĝas la pomarbojn en aprilo kaj majo. La malsano aperas ankaŭ, sed pli malmulte, de junio ĝis novembro, sed tute ne de decembro ĝis februaro de la venonta jaro.

3. La problemoj kun nunaj kuracaj teknikoj kaj fungicidoj.

La pomarba kancero estas disvastigita malsano. Agrikulturaj sciencteknikaj fakuloj elspertis kaj elstudis diversajn teknikojn kaj

fungicidojn kontraŭ ĝi, ekz. selekti kancerorezistajn variojn, fortigi la administradon kaj prizorgon de la kulturoj, fortigi la pomarbon per sterkado, kuraci aliajn malsanojn de la pomarbo, mortigi damaĝajn insektojn, forigi ĝustatempe la malsanajn ŝelojn, ofte purigi la ĝardenojn. Tiuj estas bonaj metodoj uzitaj kaj uzindaj.

Ni ankaŭ elstudis konatajn fungicidojn kontraŭ la pomarba kancero, ekz. 843 *Kangfuji*, *Fubiqing*, *Fukeqing*, *Fubizhi*, *Zhifuling*, *Fulandi*, *Chuangxiaoji* kaj aliaj. Sed tiuj fungicidoj ne estas idealaj.

Oni ĝenerale ŝmiras au ŝprucas ilin sur la pomarbo; sed ĉiuj tiuj fungicidoj estas facile akvosolveblaj. Post pluvo la fungicidoj ŝmiritaj au ŝprucitaj sur la arbo dissolviĝas kaj forfluas kun la pluvo, la fungicida tavolo sur la malsanaj lokoj ne plu povas bari la akvovaporon el la kancera ĉirkauaĵo. Kaj la akvoperdo malfortigas la pomarban kreskadon. Sed kuraci kaj samtempe bari la akvovaporon ĉe la kanceraj lokoj estas ĝuste la plej efika kaj grava metodo.

Elstudi pli efikan fungicidon kontraŭ la malsano estis do urĝa tasko.

4. Nova fungicido kontraŭ la pomarba kancero.

Jen la karakterizo de la nove pristudita fungicido "Longefika saniga fungicido kontraŭ pomarba kancero", kiu estas miksaĵo el kemiaĵoj, fabrikataj en Ĉinio: baza konsistaĵo estas linano [linalool?] (pli ol 90 %) kaj aldone plantkreskigaj kemiaĵoj kaj fungicidoj kiel *thiophanat* resp. *metilthiophanat* [M.I.9194] kaj *Carbendazim* [M.I.1771] kaj kemiaĵoj kaŝantaj la sekretajn receptojn. Ĝi estas iom acideca, diluebla plene en benzino, plantaj kaj bestaj oleoj, iom en alkoholo kaj malfacile en akvo; ĝi estas elktuarieca (?), malmoleta sub 15⁰ C, mola kaj iom fluebla ĉe 15-30⁰ C, likva super 50⁰ C; ĝi estas graseca, pro tio la pluvo ne povas forlavi la fungicidan tavolon, kiu kovras la malsanajn lokojn sur la arboŝelo. La nova fungicido ne nur kuracas la malsanon, sed povas ankaŭ rapidigi la kreskadon de la arbo, preventi la frostan atakon,

sunbrulan damaĝon kaj refojan malsaniĝon de la ŝelo. Eĉ nur unufoja uzo kapablas sanigi malsanajn lokojn, kaj la efiko estas rapida kaj longtempa.

Oni povas uzi ĝin ankaŭ kiel ŝirmilon ĉe diversaj vundoj de la pomarbo, kaj ĝi taugas pli bone ol aliaj specialaj arbovundaj ŝirmiloj.

La kuraca efikeco de la nova fungicido estas pruvita per niaj eksperimentoj en la jaroj 1994-96 en la vilaĝoj Huang Jiapu, Yudian, Gaoping kaj Jiangjia en la Gubernio Jingchuan.

Tamen, manipulado kun fungicidoj estas danĝere por homoj, bestoj kaj plantoj kaj povas kauzi venenadon al homoj kaj bestoj, se oni kontaktiĝas sen prizorgo.

5. Uza metodo.

La uza metodo estas facila. Unue oni fortranĉu la malsanajn kaj putrintajn lokojn sur la arboŝeloj, poste oni premŝmiru la fungicidon sur la partojn de la fortranĉitaj lokoj. Necesas zorgeme forigi la putrintajn partojn kaj pereigi ĉiujn eltranĉaĵojn por neniiigi la fungon. Ankaŭ necesas surmeti tavolon da fungicido por eviti la remalsaniĝon de la kuracitaj lokoj.

Adreso de la aŭtoro:

HUANG Yinbao
EASTEJ
Jingchuan Xian Kewei
CN - 744300 GANSU
ĈINIO

Tel. +86 933 332/004 (ofice)
+86 933 332/2812 (hejme)
Fax +86 933 332/1030.